

BULTENO DE "BARCELONA STELO"

JARO II.—SUPLEMENTO DE «KATALUNA ESPERANTISTO».—Januaro 1913.—N^{ro} I (7)

Grupa sidejo : Str. Marqués del Duero, 88 : Redaktoro : JOZEFO GRAU

BARCELONO VIVU, KRESKU KAJ FLORU. — L. L. ZAMENHOF

EŊHAVO : *Feliĉan Novjaron.* — *Projekto de unugrupiĝo.* *Dankon.* *Konkurso por la lernantoj,* Jozefo Grau. — *Adresaro de «Barcelona Stelo».*

FELIĈAN NOVJARON «BARCELONA STE-
LO» SINCERE DEZIRAS AL ĈIUJ AMIKOJ
DE ESPERANTO : La Komitato

PROJEKTO DE UNUGRUPIĜO

Ni invitas ĉiujn barcelonajn grupojn kaj societojn sendi delegitojn aŭ reprezentantojn al la kunsido, kiu okazos en nia sidejo str. Marqués del Duero, 88, la 23^{an} de Januaro je la 9.^a vespere.

En tiu kunsido estos prezentata antaŭ la kunvenintoj la tuta projekto de unuigi de la barcelonaj grupoj, kiun oni povos pridiskuti kaj esplori. Ni ne dubas, ke la ĉefaj bazoj kaj reguloj plaĉos al ĉiuj. Tamen la verkintoj ne pensas, ke ili faris ion perfektan : niaj amikoj povos ĝin pliperfektigi.

Per la venonta numero ni raportos pri la rezultato de la kunsido. Ni esperas, ke ĝi estos kontentiga.

DANKON

Ni ricevas jam de du-tri monatoj kelkajn numerojn de esperantistaj gazetoj interŝanĝe de nia modesta BULTENO. Ili estas : *La Ondo de Esperanto*, *Kuracisto*, *Panonio*, *Brazila Esperantisto*, k. t. p.

Aperigante nian Bultenon ni ne intencis starigi ian interŝanĝon, ĉar ni bone konscias nian malgravecon. Ni eldonis ĝin por montri antaŭ niaj samideanoj la internan vivon de nia societo kaj ĉefe por instigi la barcelonajn esperantistojn partopreni en komuna agado, vivi en rondo familia. Tio espereble sukcesos al ni.

Dume, ni plej kore dankas la redakciojn de la gazetoj interŝanĝantaj kun ni por la helpo, kiun ili donas al nia grupo, sendante ĉiujn siajn numerojn. Ili kontribuas tiamaniere al la sukceso de nia agado.

KONKURSO POR LA LERNANTOJ DE NIAJ KURSOJ

La Komitato de «Barcelona Stelo» decidis en sia novembra kunido donaci 30 pesetojn inter la lernantoj, kiuj ĉeestas la kursojn de Esperanto en nia grupo. Tiu sumo estos partigita en tri premiojn: unu da 15 pesetoj; dua da 10 pesetoj kaj alia da 5 pesetoj.

Tiujn premiojn oni aljuĝos al la lernantoj, kiuj pruvos havi pli grandajn konojn pri Esperanto en la konkursaj ekzamenoj, kiuj okazos dum la venonta Marto. Ceterajn detalojn pri tio ĉiu povas peti en nia sidejo.

JOZEFO GRAU

ADRESARO DE «BARCELONA STELO», LA 1.^{an} DE JULIO 1912

(Daŭrigo)

56	Fino. M. Grau	strato Claris, 72.
57	» R. Simó	» Rosal, 87, 1 ^r - 2 ^a
58	Sro. J. Coll	» Consell de Cent, 96, 2 ⁿ - 2 ^a
59	» M. Torrabadella	» Riereta, 15, 1 ^r - 1 ^a
60	» M. Perzón	» Mata, 32, 2 ⁿ - 2 ^a
61	» R. Teixidó	» Mar, 35, (Badalona).
62	Fino. A. Garcia	» Cruz Canteros, 15, pral., 2 ^a
63	» L. Garcia	» Cruz Canteros, 15, pral., 2 ^a
64	» C. Martí	» Salvà, 18, tda.
65	Sro. P. Garcia	» Victor Balaguer, 9, tda.